

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

Internacia

SEMAJNA

Neŭtrala

Abono ĉiu pagas laŭ la taga kurzo de sia propra valuto, se eble per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, aŭ per ĉeko, sed ne per poŝtmandato. — Abonantoj, kies abono estas finiĝinta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abono povas esti komencataj per iu ajn numero.

Por Abono oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. — Prezo de unu numero: 0.06 dolaro, 0.15 guld., 0.24 sved. kr., 0.30 svis. fk., 0.30 dana aŭ norvega kr., 0.50 peseto, 3½ pencoj, 0.50 fr. aŭ belg. fk., 0.70 liro, 1.20 fmk., 1.40 ĉ. kr., 3 germ. mk. (ankaŭ por baltaj kaj balkanaj ŝtatoj; por rusoj 1 germ. mk.), 8.— hung. kr., 35 pol. mk., 35 aŭstr. kr.; internacie 1 respond-kupon.

Por adresaĝoj ni kalkulas la prezon de 3 numeroj. — Liston de ninj Abonejoj en diversaj landoj vidu sur paĝo 4! — Germanoj ĝuas altan profiton, se ili abonas ĉe la poŝto (Postzungsliste, 13 Nachtrag, Ergänzungsheft n-o 3, paĝo 280, sub „Kunstsprachen“).

Ĉu vi iam aliĝis
al vialanda nacia
Esperanta kongreso?

Numero 84 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 14. Majo 1922.

La Konferenco en la Sekretariejo de la Ligo de Nacioj.

(Vidu ankaŭ niajn raportojn kaj ilustraĵojn en la numeroj 81—83.)

Merkredo, 19. aprilo, 10 h. matene.

Laŭprograme (vidu ET n-o 80) kiel jam antaŭan tiel ankaŭ la duan tagon estas donitaj gravaj raportoj pri Esperanto kaj ĝiaj rilatoj al diversaj punktoj.

Ludvik (Ĉeĥoslovakio) akcentas la valoron de Esp. por reciproka interkonatiĝo kiel sekvo de korespondado.

Sevenhuijsen (Nederl.) diras, ke infanoj en sia lando per la rilatoj al fremdaj Esperantistoj lernis kompreni kaj ŝati fremdulojn.

Hogg (Anglujo). Laŭ ŝia sperto la infanoj mem faras rimarkojn pri la valoro de Esp. por helpi al la paco de la mondo. Pomarici (Ital.) dubas pri tio kaj opinias necesa la influon de instruantoj por vekti abstraktajn ideojn ĉe infanoj.

Šupihová (Ĉeĥoslovakio) kontraŭparolas f-inon Pomarici kaj donas ekzemplojn.

D-ro Troegel (Germ.) diras, ke jam per legado de fremda literaturo, ekz. nur de proverboj, oni lernas ŝati fremdajn naciojn.

Haine (Belg.) akcentas — nomante ekzemplon — la interpacigan valoron de Esperanto.

Kenn (Cinujo) diras, ke ĉinaj infanoj per korespondado en Esperanto lernis ŝati fremdulojn.

Schamaneck (Aŭstr.) parolas pri blinda lernantino, kiu esprimis la feliĉon donitan al ŝi per Esperanto.

D-ro Privat (Svis.) konstataas, ke en kelkaj lernejoj la infanoj mem faras rimarkojn pri la paciga efiko de Esperanto, kaj en aliaj ne.

Hahn (Germ.) akcentas, ke instruado de Esperanto helpas ĉiun alian fakon de instruado.

Ludvik (Ĉeĥosl.) uzas Esperanton kun sukceso por instruado de la geografo.

Young (Skotl.) nomas Esperanton la plej bona rimedo krei intereson pri la geografo.

Pomarici (Ital.) diras, ke Esperanto vigligas la instruadon de geografo.

Cze (Ruman.) Korespondado kaj interŝanĝo multe helpas.

D-ro Privat (Svisl.) Estas bone, ke la instruisto gvidu la lernantojn iomete, por ke ili skribu aferojn utilajn.

Watson (Skotl.) Ĉe la infanoj oni komencu repacigi la mondon. Korespondado en Esperanto faciligas tion.

Hahn (Germ.) spertis, ke per la internacia korespondado la spirita horizonto tremege plivastigas.

Ducommun (Svisl.) opinias, ke la instruisto devas zorgi pri tio, ke la korespondado estu interesa laŭ la enhavo.

Šupihová (Ĉeĥosl.) transdonas la salutojn de siaj lernantoj.

Sevenhuijsen (Nederl.) kolektas kaj ordigas poŝtkartojn por celoj de geografia instruado.



El la lando de nia Dekkvara:
Finnlanda laga pejzaĝo.

Ludvik (Ĉeĥosl.) rekomendas, ke la instruistoj peru sendon de poŝtkartoj kolektitaj en unu koverto por ŝpari la sendokoston al la infanoj.

Beckmann (Sved.) Oni zorgu, ke lernantoj havu korespondadon kun same lertaj infanoj.

Holmes (Anglujo) spertis, ke oni povas bone influi la interesojn de la geknaboj per gvidado ĉe la korespondado internacia.

Cze (Ruman.) nomas Esperanton praktikan kompletigilon por la prediko.

Caldwell (Angl.) kaj Deligny (Franc.) donas konsilojn, kiamaniere malkarigi la korespondadon por la infanoj.

Poncet (Franc.) ŝatas Esperanton kiel helpilon por lerni geografiajn nomojn.

D-ro Dietterle (Germ.) proponas kreon de centrejoj por perado de korespondado.

Jacob (U. E. A.) intencas organizi tian bultenon.

Thomson (Anglujo) donas informojn pri la Skolta Esperantista Ligo.

Drummond Page (Angl.) Kvankam la ĉefskolto Sir Rob. Baden-Powell rekomendas Esperanton, la skoltestroj ĝenerale ne ŝatas ĝin.

Bovet (Svisl.) plene aprobas la jenan proponon pri Skoltoj de s-o K. Graham-Thomson.

„Ke ĉi tiu Konferenco de Geinstruistoj el 28 landoj, konstante la grandan edukadan valoron de la Geskoltaj Movadoj de la mondo, simpatias kun la nuna instruado de Esperanto inter geskoltaj kaj rekomendas, ke la estroj de la Geskoltaj Movadoj en ĉiu lando subtenu la instruadon de Esperanto inter la geskoltaj.“

La propono estas unuanime akceptita.

D-ro Privat (Svisl.) rekomendas fervoran agadon ĉe la ruĝkrucaj asocioj.

Rezolucio pri la Ruĝa Kruco, simila al tiu pri la skoltoj estas akceptita.

Laste oni legas diversajn saluttelegramojn. La oficiala delegito de la albana registaro ne ĉeestas pro malfruigo.

Merkredo, 19. aprilo, 15 h. posttagmezo.

D-ro Dietterle tre detale parolas pri la diversaj punktoj de la „Pedagogia Demando“. Li opinias, ke manko de logika kapablo povas esti la kaŭzo por tio, ke la infanoj tute ne lernos Esperanton. Ankaŭ la vorfarado prezentas specialajn malfacilaĵojn. La daŭro de la instruado dependas ĉefe de la aĝo, en kiu oni komencas. Spertoj en Germanujo montris, ke estas plej bone instrui 12—13-jarajn geknabojn dum 2 jaroj, du horojn posamejne en la unua kaj unu horon posamejne en la dua jaro.

La heleco de Finnlanda somernokto.

Naturpriskribo de fama finna poeto
Zacharias Topelius.

La pentristoj penadis priskribi la plej ĉarmajn lumojn sur la ĉielo. Ili prezentis la sunon kaj la lunon en ĉiuj pozicioj sur la ĉielo, sed neniu povis ankoraŭ prezentit sur ŝtofo la mirindan helecon de somernokto en la nordo.

La lumo de la suno kaj de la luno etendiĝas de unu loko al ĉiuj objektoj, kiuj estas en ilia lumo, kontraŭe la aliaj objektoj restas en ombro. Sed en la hela somernokto briletas la tuta ĉielo, precipe en nordo, kaj la aero mem ŝajnas spegulumi en milda, dolĉa lumo. Kiam la norda ĉielo estas nubokovrita, nenia ombro estas vidata, tial ke la lumo venas de ĉiuj direktoj kaj ŝajnas foriri de la objektoj mem. Kiam la suno subiris por sia mallongedaŭra ripozo, la tuta naturo kvazaŭ falas en strangan, songantan animstaton. La disdonado de la lumo estas for, la plej oftaj birdoj estas silentaj, la homoj kaj la bestoj serĉas ripozon, la kreskaĵoj atendas nokton, kaj la nokto eĉ ne venas. Anstataŭ tio, nehela, brilanta lumo disvastiĝas super la bordoj, akvoj kaj arbaroj. Ĝi ne estas sunlumo, nek lunlumo, nek stellumo, nek krepusko; ĝi estas la stranga, silenta, heligita lumeto de la nokto, milda kaj solena, kiel la eterna ĝojo meze de malaperanta printempo de la tero.

Mi serĉas aliajn bildojn en la vivo por povi kompari ilin al ĉi tiu, sed mi ne trovas eĉ unu, klun oni povus apudigi al ĉi tiu lumigita nokto, se ne eble la lumeton de vespero en la fenestroj de tiu senhoma domo, kie antaŭe loĝis karaj

amikoj, aŭ la brilon de amaj okuloj, kiam ili kun larmoj de nepriskribebla amo nin rigardas.

En tia noktobildo estas nenio, kio mirigus. La okuloj ne blindiĝas, la koro batas trankvile; ĉio ŝajnas esti kiel antaŭe, kaj tamen ĉio estas almaniere. La tuta naturo brilas, ĉio estas tiel dolĉamola, tiel klara kaj tiel trankvile meditema. La herbo similas plej delikatan veluron, ĉiuj folioj aspektas diafanaj; eĉ la plej ĉiutagaĵoj objektoj, kiel barilo, fojnejo, ĉevalo sin paŝanta sur herbejo, aspektas tiel strange kaj mirinde ĉarmaj. Se mi promenas en la arbaro, la sovaĝaj pinoj prezentigas al mi kiel kotonokovritaj. Se mi remas sur la lago, ŝajnas al mi, kvazaŭ la bordoj neniam estus estintaj tiel ĉarme belaj. Krom tio ĉie regas silento, kiun interrompas nur la harmonia kantado de turdo kaj la sento de soleco, kiun la nokto ĉiam vekas. Ĉio ĉi kvazaŭ enfluas en la animon de rigardanto. Li rekonas en si la sekretan interligilon kun la naturo kaj ĉiuj vivantaj bestoj. Estas, kvazaŭ la heleco de nokto transloĝiĝus en la okulon de homo.

La birdo scias sian tempon: ĝi dormas kiel eble plej malmulte. Unu horon aŭ du ĝi kaŝas sian kapeton sub la flugilo, kaj poste ĝi denove komencas ĉirpi. La popolo sur la kamparo ankaŭ scias tion; multaj dormas en la vintro dek aŭ dekdu horojn, sed en la somero tri aŭ kvar. Nur meze de inteligentularo troviĝas tiaj, kiaj renversas la ordon de la naturo. Longajn vintrojn ili povas maldormi ĉe la lumo de lampoj kaj kandeloj, sed la lumajn noktojn de somero ili dormas post la fenestrokurtenoj. Kaj tamen estas domaĝe ĉi tiel perdi tion, kio estas plej bela en la naturo.

Eifinnigis H. S.

Patrino.

De A. Kivikas.

El la estona lingvo tradukis Henriko Seppik.

La gardestaranto frapadis per la pafila tenilo la malvarmiĝintajn en la botoj piedojn kaj dancis sur la rigidaj piedfingroj antaŭ la en profunda neĝo dormanta domo, kiun okupis la batalona stabo. Liaj malkvietaj okuloj kiel lumetiloj observadis la ĉirkaŭaĵon, la oreloj kaptadis la plej mallaŭtajn sonojn el la aero.

La ordonita tempo de l' gardestaranto estis jam finiĝinta, kiam la deĵoranta oficiro de l' bataliono ricevis de l' kapitano specialan ordonon.

La deĵoranto legis la krajonan tekston sur la poŝlibra folio kaj blasfemis, kiam li estis ankoraŭ en la korto. La brutaj vortoj sonis en la frosta kaj malluma nokto kiel rauka ĉevala bleko.

Laŭ ordono de l' deĵoranto la gardestaranto alkondukis el la roto kvin virojn, la oficiro tondre diris al ili la malfablaĵajn komandovortojn kaj ekiris.

Iu fremdulo estis ilia kondukanto.

La neĝo grincis sub la piedoj, la frosto igis kraki la tegmenton, la murojn kaj trabojn, tranĉis akre la vestaron de la viroj, ĉe enspiro enboriĝis en la buŝon kaj nazon, igis prulnaj la tremantajn palpebrojn, raspis la pied-kaj manfingrojn kaj nebuligis la elspiraĵon, kiu kuŝiĝis glacie sur la barboharoj. La malvarmega pafilo, tuŝante la nudan vangon, bruligis kiel fajrbruga fero kvazaŭ malsate mordis la haŭton.

La buŝoj de l' militistoj blasfeme kraĉis en la grincantan neĝon.

Ĉe la alia fino de l' vilaĝo ili atingis kadukan kabanon.



Rekomendinde, kvankam ne ĉiam eble, ŝajnas, ne komenci la termon de alia fremda lingvo ne antaŭe lerninte Esperanton. Paroli nur Esperanton helme kun la infano antaŭ kiam ĝi lernis gepatran lingvon ŝajnas interesa eksperimento, sed ne konsilinda por granda skala realigo. Pri metodoj de instruado: Kvankam la pure gramatika metodo ne estas rekomendinda, oni ankaŭ ne trouzu la rektan (senperan). Oni povas ankaŭ konsentii, ke oni instruu aliajn lecionojn (geografio, historio) per Esperanto. Rilate elparolado ŝajnas konsilinde fiksi la plej bonan per gramofono. Por la instruado necesas multa bona internacia legmaterialo. — Ni ne postulu ĉie kaj tuj la devigan enkondukon de Esperanto; ni postulu simple, ke ĉiu registaro koncedu al ni la eksperimenton, kie troviĝas sufiĉe da bonaj instruistoj. — Ni ne estu troigemaj, ne ĉiam parolu pri la facileco de la lingvo, kaj ankaŭ ne esperu tro multe da sukceso atingota per la Konferenco. Ĝi estas la unua, klun verŝajne baldaŭ sekvos dua.

D-ro Privat (Svisl.) konsilas modestecon en niaj postuloj pri enkonduko de Esperanto kaj proponas, ke d-ro Dietterle interrilatu kun la Akademio pri pedagogia vortaro. Pri la lingvo mem P. diras, ke ni devas zorgi, ke ni ne tuj konsideru ĉion eŭrop-amerikan kiel necese bonan Esperanton. La demando, ĉu post oficiala enkonduko de Esp. en lernejo estus preferinde enkonduki ĝin en kelkajn klasojn, kie estas bona Esperantista kompetenta por instruado, aŭ instruigi pere de specialista instruisto (ne regula instruisto de la klaso).

D-ro Dietterle (Germ.) respondas, ke li preferas specialiston. Rudhardt (Svisl.) proponas instruadon pere de specialistoj nur por la komenco.

Dixon (Angl.) konsentas Rudhardt'on. D-ro Privat (Svisl.) ĉiu klasestro fariĝu specialisto.

Toschi (Ital.) La instruistoj mem instruojn sian klasojn.

Ludvik (Ĉeĥosl.) diras, ke en lia lando povas instrui nur instruistoj kun atesto.

Meyer (Franc.) preferas la klasestrojn Esperantistojn por la instruado. Oni komencu la instruadon jam en la oka jaro.

Hogg (Angl.) de mallonga tempo provas, ĉu infanoj nenormalaj povas lerni Esperanton.

Schamaneĥ (Aŭstr.) scias unu okazon de tia infano, kiu almenaŭ havis grandan interesecon por Esperanto.

Rudhardt (Svisl.) Certe ĉiu normala infano povas lerni Esperanton.

Haine (Belg.) faris bonajn spertojn kun instruado al 10-jaraj infanoj, parolante pri gramatiko nur en la dua jaro.

D-ro Dietterle (Germ.) raportas pri la ekzamenoj en Germanujo.

Piatti (Italujo). Preskaŭ ĉiuj infanoj povas lerni Esperanton. Rilate la instruistojn li konsentas kun Meyer.

D-ro Privat (Svisl.) proponas kursojn por instruistoj, por ke ili estu pretaj, kiam Esp. estos deviga.

Haine (Belg.) Post oficialigo de Esperanto, kiam oni pagos la instruistojn por la scio de Esp., ili tuj kaj rapide lernos Esperanton.

D-ro Privat (Svisl.) Entuziasmo estas necesa; ni ne bazu nin sur bazo financa.

La spertoj faritaj kun deviga aŭ nedeviga instruado estas tre diversaj. Post diskutado pri ĝi d-ro Privat (Svisl.) resumas, ke la ĝenerala deziro de la Konferenco estas, ke la registaroj se eble enkonduku instruadon devigan.

Merkredo, 19. aprilo, 20^{1/2} h. vespere.

Publika kunsido en L'Athénée.

D-ro Fisher (Angl.) parolis angle pri la utilo de Esp. en mezgradaj lernejoj.

Young (Angl.) same en unuagrada lernejoj.

Sekvis diversaj paroladetoj en Esp. de diversnaciaj delegitoj por ke la aŭskultantoj aŭdu la sonon de la lingvo.

D-ro Privat (Svisl.) parolis ĝenerale pri la elementoj de la Esperanta gramatiko.

Prof. Collinson (Angl.) raportas pri fondo en Liverpool de Asocio de Esp. instruistoj, kiuj per interŝanĝo de ideoj konstatis, ke Esp. estas facile lernebla, multe helpas al la studado de aliaj lingvoj, lernigas pli bonan uzon de la propra lingvo kaj estas logiko aplikata. Laste la studo de Esp. naskas ĝeneralan interesecon pri la homaro kaj riĉigas la scion pri la geografio.

Merkredo, 19. aprilo, 22.15 h. vespere okazis familia akcepto en salono de l'Athénée per d-ro Privat, kiun multaj ĉeestis.

Ĵaŭdo, 20. aprilo, 10 h. matene.

Unue estis pritraktita la Parlamaenta Demandaro, kiu enhavas jenajn 10 punktojn:

Parlamaenta demandaro.

1. Ĉu Esperanto estas instruata en via lando kiel eksperimento aŭ pro definitiva decido?
2. Kiu decidis la aferon?
3. Kiu proponis?
4. Kiu apogis?
5. Kia estas la rolo de la Nacia Parlamento en tiu rilato?
6. Kia estas la rolo de provinca konsilantaro?
7. Kia estas la rolo de urba aŭtoritato?
8. Ĉu la koncerna aŭtoritato provis ion por certigi reciprokecon eksterlande?
9. Ĉu reciprokeco estis aludita dum la diskutado?
10. Kiu povo en via lando rajtas trakti pri reciprokeco?

Post pli malpli longaj raportoj de la diversnaciaj delegitoj

D-ro Privat (Svisl.) resumas: Unuflanke, oni povas en kelkaj landoj komenci tuj la instruadon de Esp. kiel elekta temo de kelkaj aŭtoritatoj. La registaro povas permesi tion. Tio estas la unua ŝtupo. Poste oni povas ataki la parlamentojn, kiuj povas plidefinivi la aferon. Pri reciprokeco tiam estas du ebloj. Unue, la Ministroj devas enketi mem rekte en aliajn landojn al la tieaj Ministroj. Li konsilas, ke oni instigu la Ministrojn tion peti. Due, pri la parlamenta agado kaj la Ligo de Nacioj. Pri tio estis elektita en Praha Komisiono, el kio parte rezultis la nuna konferenco.

Kamaryt (Ĉeĥosl.) raportas pri la agado de la Komisiono (kaj la cirkonstancoj, kiuj okazigis la Konferencon. Ĝis nun la Konferenco aŭdis faktojn. Nun ni devas konsideri, kiel labori por la estonteco. La propagando parlamenta devas komenciĝi internacie, kio nun estas pli facila ol antaŭe, ĉar ekzistas Ligo de Nacioj. La laboro farita ĝis nun rilate la L. d. N. estas vere maldika; kaj ni devas tion danki al s-o d-ro Privat.

D-ro Privat (Svisl.) raportas pri la favora al Esp. opinio de d-ro Beneš. Poste li prezentas jenan proponon:

„La Konferenco decidis konstantigi la Komisionon elektitan en Praha, kaj starigi internacian centron dokumentan kaj agadan pri Esperanto en lernejoj. La estraro de la Komisiono organizu tiun centron sub nomo Oficejo aŭ Instituto kaj decidu provizore pri la loko.“

Klarige li aldonas, ke la Komisiono devas sin kompletigi post korespondo kun la naciaj Societoj. Ĝis tiam oni povas konsideri, ke la estroj de la naciaj societoj ĉi tie estu konsidereblaj kiel komisionanoj. La estraro havu la taskon formi la komisionon laŭ tiu principo.

La propono estas unuanime akceptita.

Post interesa diskuto oni akceptas ankaŭ proponon de Czubrynski (Polujo), laŭ kiu la naciaj

societoj sin turnu al sia nacia parlamento kun la propono, ke la registaro enmetu Esperanton kiel internacian helpan lingvon en la programon de la lernejoj de la lando, kun la rezervo, ke aliaj registaroj ankaŭ tion faros.

Oni nun revenas al la „Propozicio pri Centro.“ D-ro Privat (Svisl.) diras, ke oni petos la L. d. N. pri protektado. Se la peto estus rifuzita, oni povus daŭrigi kaj plifirmigi la rilatojn al la Instituto J. J. Rousseau kaj peti ties moralan subtenadon. Oni ankaŭ sin povas turni al grandaj institucioj kiel Ruĝa Kruco.

La propono, ke la Centro restas en Genève pro la interrilatoj kun la L. d. N., estas unuanime konsentita.

Poste oni fiksas la tekstojn de kelkaj akordoj, kiuj eventuale estu proponitaj al interesitaj ŝtatoj aŭ edukaj aŭtoritatoj.

Post ricevo kaj forsendo de diversaj telegramoj i. a. al la konferenco en Genova oni fermis la kunvenon.

Ĵaŭdo, 20. aprilo, 15 h. posttagmeze.

D-ro Privat (Svisl.) anoncas la eldonon de libro pri G. Williams, la fondinto de K. U. J. V. (Y. M. C. A.) en Esperanto, kiun eldonis la Tutmonda Alianco de K. U. J. V.

Nuñez (Hisp.) proponas

„Ke ĉi tiu konferenco de ĝinstruistoj, konstatante la grandan praktikan valoron de Esperanto, simpatias kun la nuna instruado de la internacia lingvo inter policianoj por helpo al la fremdaj vojaĝantoj sur stratoj kaj rekomendas, ke la poliestroj en ĉiu lando subtenu ĝian instruadon.“

La propono estas unuanime akceptita.

Ken n (Ĉinujo) prezentas jenan rezolucion:

La organizo de

„Internacia Esperanto Eldonanta Asocio“.

Por ke Esperanto progresu, estas necese, ke ĝia uzado praktike disvastiĝu, sed tio ne rezultus, esceptinte ke Esperanta literaturo havus grandan influon en la politika, komerca kaj intelektaj rondoj. Por atingi tiun celon, estas necese por la komenco organizi „Internacian Esperantan Eldonan Asocion“. Jen estas kelkaj ideoj:

La Asocio estos fondata laŭ la komuna konsento de ĉiuj landoj kaj enhavos por siaj membroj ĉiujn spertajn Esperantistojn kaj Esperantistajn aprobantojn.

La „Eldona fako“ fariĝos la plej granda parto de la Asocio kaj laboros por traduki ĉiujn diverslingvajn verkaĵojn, sciencajn kaj literaturajn, kiuj estas famaj aŭ noveldonitaj.

La Asocio devos havi grandan presejon. Ĉiuj eldonitaĵoj estos vendotaj malkare, ne por profito, sed por Esperantismo.

Por proviza kaj subtenanta mono ĉiuj delegitoj de la Konferenco petu subvenciojn de la registaro kaj de la popolo de sia lando.

Se ĉi tiu ideo estos akceptita, bonvolu organizi specialan komisionon por la plano de la Asocio.

Oni elektis komisionon por pritrakti tiun ĉi demandon, kies prezidanto estas s-o Rollet de l'Isle, kaj al kiu apartenas i. a. d-ro Dietterle kaj Kenn.

Ken n (Ĉinujo) plue prezentis deziresprimon pri Esperanto en elementa lernejo, sed reprenis ĝin laŭ peto de d-ro Privat.

Tajnokinen (Finnl.) salutas la Konferencon kaj esias speciale dankita de

D-ro Privat (Svisl.), ĉar Finnlando estas la unua ŝtato en la mondo, kiu per parlamenta baloto decidis helpi la Esperantan movadon. P. petas, ke s-o Tajnokinen transdonu la salutojn de la Konferenco al la Finnlanda Registaro.

Plue li dankas s-on Fujisaŭa por la raporto pri la funkciado de la L. d. N., kiu estos donata

Sed la militjuĝistaro ne vidis la maljunan virinon, kiu staris piednuda kaj ĉemizvestita en la vintra frosto kaj neĝo post la fenestro. Por ŝi la kondamniton estis la suno kaj varmo de l' maljunecaj tagoj. Ŝi estis la patrino, kiu el sia amanta korpo estis naskinta la kondamniton, portinta lin dum naŭ monatoj en sia krea sino, per sia varma mamlakto kreskiginta lin forta viro; kaj por li ŝiaj manoj estis plenaj de kaloj kaj malmolaj por malfacila laborado, ĉar lin ŝi estis aminta en sia koro de lia naskiĝo ĝis la griziĝo de siaj haroj.

Nun la militjuĝistaro kondamnis lin al morto per pafado.

La kondamniton oni elkondukis, la soldatoj starigis lin apud la muro kaj pafpretaj reiris dek paŝojn.

„Al vango!“

La patrino vidis, ke kvin nigraj pafituboj malrapide levigis kaj haltis en la brustalteco de ŝia filo.

Ŝi kuris antaŭ ilin por gardi per sia korpo la filon kontraŭ la kugloj. Sed je la haroj oni trenis sin flanken kaj jetis en la neĝon.

Ĉe l' ordono:

„Pafu!“

eksonis pafoj kaj samtempe aŭdiĝis korsiranta, malespera ekkrio.

Sed ĝi ne venis de l' pafito, ĝi estis la korekrio de l' maljuna patrino, kiu ĉeestis la mortigon de sia filo.

Ŝi saltis al la filo, kuŝanta en la neĝo, kaj senforte falis sur lian sangon kadavron.

Sed kiam ŝiaj malmolaj, de laborado fenditaj fingroj ektuŝis la sangon, el ŝia sendenta buŝo eligis la grava vorto:

„Mortigintoj!“

Sed la pafintoj estis jam foririntaj. En la korto estis nur malvarma neĝo, sur kiu kuŝis la morti-

al ĉiu Konferencano, kaj ankaŭ al la kunhelpintoj, kiuj skribis la multajn dokumentojn. Fine li gratulas la rondeton Esperantistan en la Oficejo de la L. d. N. kaj pri ĝia tre interesa gazeto „Nova Tagiĝo“.

Page (Angl.) prezentas tekston de manifesto al la instruistaro de la tuta mondo. Pri ĝi oni detale diskutis kaj fine akceptis la tekston, kiun ni publikigis en n-o 83. Samtempe estas esprimita la deziro, ke la teksto el Esperanto estu tradukota en naciajn lingvojn kaj transdonota al naciaj gazetoj.

Bovet (Svisl.) raportas, ke la venonta kongreso pri morala edukado (fine de julio en Genève) uzos Esperanton kiel oficialan lingvon.

Alessio (Ital.) esprimas al la L. d. N. la dankon de la Konferenco por la gastigo.

Page (Angl.) same al la oficistoj, kiuj laboris por la Konferenco.

D-ro Dietterle (Germ.) akcentas la eminentecon de d-ro Privat kiel parolisto kaj prezidanto, same energia kaj bonhumora kaj aminda homo kaj samideano. Per manpremo li esprimas al li la dankon de la Konferenco.

D-ro Privat (Svisl.) korege dankas al ĉiuj, kiuj helpis la sukceson de la Konferenco. Li esperas, ke el ĝi ankaŭ niaj internaciaj kongresoj multe lernus rilate ordon kaj seriozecon. Certe ankaŭ la Konferenco ne restos sen impresoj al la registaroj; kaj ili konvinkiĝos, kaj ne ekzistus ia ajn risko ĉe la enkonduko de Esp. en lernejojn, eĉ se Esp. ne sukcesus kiel internacia lingvo. Plue li memoris je nia Majstro kaj je Hodler, al kies honoro la ĉeestantoj levigis. Nun li admonis la kunlaborintojn, helme daŭrigi seriozan laboron por nia afero. Ni laboru, ke niaj infanoj havu feliĉan estonton, ke ili lernu servi al la homoj kaj ne malutili, ke ili metu sian batal-

eman instinkton, metu sin al la servo ne de la milito, sed de la paco!

Feliĉan revenon al viaj hejmoj kaj denove koran dankon!

— Fino de la konferenco. —

(La raporto estas mallongigo el laŭvorta stenografia raporto farita de s-o M. C. Butler laŭ la sistemo „Raporta Stenografia“, kies 5-an Esperantan eldonon oni ĵus eldonis en Anglujo.)

Esperanto ĉe Japana Parlamento.

La petskribo prezentita al la Parlamento, ke oni komencu esploron pri la enkonduko de Esperanto en lernejoj, estas akceptita ĉe la Malsupra Domo, la 15. febr., sub klarigo de s-o S. Marujama, deputato. — Ĉe la Supra Domo ĝi ankoraŭ ne venas en la tagordon, sed la cirkonstancoj antaŭdiras ĝian akcepton; kredeble Princo Niĝo, direktoro de la Komisiono pri Petoj, estas ĝia klariganto. — La sukceson oni devas danki al s-oj K. Janagida kaj M. Ga. (Laŭ „La Revuo Orienta“)

I-a Tutestonia Esperanto-Kongreso.

La 2. aprilo okazis en Tartu (Dorpat) la I-a Tutestonia Esperanto-Kongreso, partoprenita de 82 samideanoj el Tartu, Tallinn, Narva, Valk, Paide k. a.

La kongreson malfermis je 10 h. matene prof. Väisälä. Oni elektis s-on H. Busch prezidanto de la kongreso, f-inon H. Dresen vicprez., s-ojn H. Sakaria, J. Laarmann kaj M. Einer sekretarioj. Saluttelegramojn sendis la ministro por instruado s-o Bauer, la Centra Lernejo-Junulara Ligo Estona (Esperante) k. a. Kiel kongreslingvon oni elektis Esperanton.

La raportoj de la reprezentantoj de la Esp. societoj donis klaran bildon pri la agado de la societoj. En Narva estas societo kun 105 anoj;

pafito kaj sur li la kaduka patrino, kies pro maljuna juneco grizaj kaj maldensaj haroj kungluegis kun la varma korsango de la filo.

En la matena lumo gardestaranto haltis antaŭ du kadavroj. Unu estis la morpafito kaj apud li la patrino piednuda kaj ĉemizvestita. La maljunaj grizaj, maldensaj haroj estis glaciigitaj en la sango, kiu fluus el la kuglovundoj, kaj ruĝe koloris la neĝon. En ambaŭ okuloj de l' patrino estis glaciiginta larmo, kiu plendegis al la ĉielo.

„Homoj, kion vi estas kun ni farintaj!“

Esperanto kiel radiografita lingvo

akceptita kiel fakto en nacilingva romano.

Jam kelkfoje ni legis en nacilingvaj romanoj mension pri Esperanto kiel tutmonda lingvo. Nun ni trovis en romano „Im Banne des Meteors“ (En magia forto de l' meteoro), verkita de R. Eichacker laŭ teknika ideo de Max Valier kaj ĵus publikigata en „Das illustrierte Blatt“, Frankfurt a. M., numero de 9. majo, radiogramon en Esperanta lingvo, sed sen mencio de l' vorto Esperanto. La romano, kiu estas fantazia romano, akceptas do Esperanton kiel faktan lingvon por tutmondaj interrilatoj en la estonteco. Ni mem konstatis, ke leganto (neesperantisto) ekmiris legante la radiogramon kaj meditis pri la siranga fremda lingvo kiu estis nek hispana (kvankam la radiogramo venis el Sudameriko) nek itala nek latina. Jen la teksto de la mistera radiogramo: „Nigra ronda punkto diametris sunon eble planetido au komedido hodiaŭ 19 h 30 m 22,45 — 19 h 38 m 16 s tm t. — Don Ebro Valparaiso.“

funkcias 3 kursoj. — En Valk estas kurso. — „Espero“ en Tallinn, fondita la 18. majo 1919, nun havas pli ol 300 anojn. La bibliotekon formas pli ol 500 libroj. Entute estas aranĝitaj 14 kursoj kun pli ol 300 efektiva lernantoj: nuntempe funkcias 4 kursoj. La tekcion de prof. Väisälä partoprenis pli ol 400 personoj, el kiuj pluraj enskribiĝis por la kursoj. — La societo en Tartu, fondita nur antaŭ kelkaj monatoj, jam havas 40 anojn, plejparte studentojn. Estas aranĝataj kursoj. — Pri la agado de la kongresa komitato raportis s-o Einer. — Laŭ la deziro de l' kongreso f-ino H. Dresen, del. de UEA, diris kelkajn vortojn pri la stato de UEA en Tallinn, kiu havis 15 membrojn en 1921, 29 en 1922.

Tre detale estis pridiskutata la fondo de Esp. Asocio de Estonio. Konsiderante la fondon de Asocio necesa, la kongreso akceptis ĝian regularon proponitan de „Espero“ kaj elektis la societojn en Narva, Tallinn kaj Tartu ĝiaj fondantoj. De 2 h. ĝis 5 h. estis paŭzo. Fotografado de la kongresanoj.

Je 5 h. oni daŭrigis la laboron. S-o Einer interese referis pri Esp. lernolibroj por estonoj. S-o Sakaria parolis pri la neceseco de tuj eldono de estona-Esp. kaj Esp.-estona vortaroj. Li informis, ke estona-Esp. vortaro jam estas kunmetita de s-o Rosenberg.

Post aŭskulto de la raporto de f-ino Dresen pri ŝtata subvencio, la kongreso decidis komisi al la fondota Asocio klopodi pri ŝtata subvencio por eldono de Esp. lernolibroj kaj vortaroj.

Por akceli la propagandon, oni decidis aranĝi specialajn informojn, kiuj dissendu priesperantajn sciligojn al ĉiuj gazetoj de Estonio.

F-ino Dresen atentigis la kongresanojn pri la ekzisto de maŝinskribata „Estonia Esperantista Revuo“ kaj petis sendi al ĝi regule sciligojn pri la movado en Estonio.

S-o Vaher estis elektata por informi la Ministraron per Eksterlandaj Aferoj pri la decidoj de la kongreso kaj peti ĝin subteni la Esp. demandojn de la Ligo de Nacioj.

Post aŭskulto de la kasa raporto, la prezidanto finis la kongreson je 8 h. vespere.

Mallongaj sciligoj el Palestina lando.

Tre severaj antaŭrimedoj estis publikigitaj en Jerusalemo por eviti malpacon inter araboj kaj judoj okaze de la proksima paskofesto kaj popolamasigoj.

Post Lord Northcliffe ankaŭ Lord Milner vizitis grandan parton de Palestino kaj Transjordanio. Li montris tom pli grandan kontenton je judaj kolonioj kaj zionistaj laboroj.

Turistoj kaj pilgrimantoj alvenis grandnombre dum la du lastaj monatoj, precipe el Usono en anglaj kaj amerikaj luksoŝipoj.

La palestina fervoja reto kreskis lastjare de 1000 ĝis 1450 km kaj depost marto perfektigis trege laŭ nombro, rapideco kaj materialo de la vagonaroj.

La nuna oranta rikolto produktos unu milionon da kestoj: 400 000 sendotaj Egiptuon, 400 000 Britujon, la resto Siron kaj Transjordanon. Lastjare la rikolto estis nur 831 000 kestoj.

En la famekonataj turoj de David kaj Hippikus en Jerusalemo funkcias dum aprilo riĉa ekspozicio de objektoj de metioj kaj industrio palestinaj.

Esperantistoj Jerusalemaj intencas eldoni specialan revuon. Ĉu ne estas prefereble subteni kaj plifortigi la novan egiptan revuon?

Haifa, 6. IV. 22.

P. E. S.

Laboristaro.

Por-Esperanta rezolucio de Norvega Asocio de Librobindistoj.

Dum Pasko la Norvega Asocio de Librobindistoj en sia ĝenerala kunsido en Kristiania i. a. akceptis unuanime jenan rezolucion:

Ĝenerala Kunsido de Norvega Librobindistoj en Kristiania konsideras, ke por efektiviĝi la intiman kunlaboradon kun la eksterlanda laboristaro, estas necese forigi la nunajn lingvajn barojn kaj akcepti nur unu lingvon internacian. Ekkoninte, ke la neŭtrala lingvo Esperanto jam estas divastigata tra la tuta mondo kaj praktike uzata en la servo de laboristoj, ni admonas la norvegan laboristan partion kaj la tutlandan sindikatan asocion de la laboristoj, agi por divastigi la konon pri Esperanto kaj en ĉiuj urboj starigi kursojn por ellerni tiun lingvon.“ (M.M.)

Svislando.

En Lugano fondiĝis Laborista Grupo; kunveno ĉiulunde je 20 h. ĉe Laborĉambro. En Bellinzona komenciĝis kurso por progresintoj.

Novaj grupoj de GLEA.

Al Germana Laborista Esp. Asocio aliĝis novaj grupoj en Essen-Holsterhausen, Halberstadt, Freiburg i. Br., Schweidnitz, Linden kaj Dahlhausen i. W.

Bontemplanoj.

Invito al bontemplana kongreso dum la XIV-a Universala en Helsinko.

Bontemplanaĵoj loĝitaj en Laihka kaj Vähäkylä, kiuj oficiale uzas Esperanton en sia eksterlanda korespondado, kore invitas eksterlandajn Esp. bontemplanojn al faka kunsido.

Certe niaj eksterlandaj samideanoj tiel multe interesiĝas pri nia abstinencia movado kaj nia malpermesa leĝo kiel ni pri la sama movado eksterlande kaj pri la interkonatiĝo kun vi.

Aliĝojn akceptas J. W. Pukkila, loĝirajtigito; adreso: Laihka, Vedehoja.


Polico kaj Esperanto.

La polico estas unu el la plej gravaj publikaj institucioj, ofte tre ŝatata, ofte malŝatata, tamen ŝtata necesajo ĉiulanda. Ĝiaj kompetentajoj ne estas limigataj tiel precize, kiel tiuj de aliaj institucioj (ekz. poŝto kaj fervojo).

La polico ĉiulanda devas garanti la publikan ordon, bonfartecon kaj sekurecon. Ĉi tiuj noblaj devoj preskaŭ rilatas kaj tuŝas ĉiujn publikajn aferojn. La polico ĉiulanda deĵoras laŭ la komplikataj landaj leĝoj kaj diversparlamentaj instrukcioj. Ĝi ne rajtas decidi pri ĉi tiuj leĝoj, aŭ kiuj ĝi helpas kaj ŝirmadas la bonulojn kontraŭ la malbonuloj, kontraŭleĝuloj kaj malhonestuloj. Vera polica deĵoro multe povas sukcesigi la ĝeneralan publikan bonon per atentigaj kaj avertaj informoj kaj publikigajoj.

Kontraŭleĝuloj endangerigas la ŝtatan ordon, la sanecon kaj havaĵojn de la ŝtataj bonuloj. Pro tio ilia kontraŭbatalo egalas ĉiulande kaj devas interesi ĉiun veran honestulon kaj amikon de ordo kaj sekureco. Por certigi ĉi tiujn necesajojn, subteno bonulo kaj polico unu la alian!

Malbonuloj persekutataj de la polico ĉiulanda ofte forkuras en alian landon, por kaŝe vendi la aĵojn akiritajn malhoneste, kaj speciale, por eviti siajn kapton, kondamnon kaj punon. Sentaŭguloj tute ne pliboniĝas en alia lando. Ili poste daŭrigas kontraŭleĝajn, malhonestajn egojn, endangerigas ankaŭ flé ordon kaj sekurecon publikajn.



Polica Esperanta Societo, Dresden (Germ.).

En policaĵ faggazetoj disputadas kompetentuloj denove, por organizi pli efikan internacian batalon kontraŭkrimularoj. Oni ekkonas kaj konfesas la lingvaj malfacilaĵojn. La policistoj tute ne povas ellerni diverspopolajn lingvojn, por interrilati kun la diverslanda polico.

Krome la polico ĉiulanda garantias la publikan bonfartecon. Ĉi tiun noblan devon plenumas la policistoj deĵorantaj diversmaniere. Ili informas, subtenas kaj helpas la bonulojn kaj fremdulojn pri faroj malpermesitaj, pri vojoj, rifuĝejoj, elserĉado de personoj mistere aŭ ne mistere malaperintaj, pri flidindaj aŭ malfidindaj negocistoj kaj meilistoj, pri malfeliĉaĵoj, perditaj kaj trovitaj havaĵoj ktp. Resume: Policistoj estas helpantaj amikoj por ĉiuj bonuloj kaj malhelpantaj malamikoj por la malbonuloj. Tamen policistoj ne povas helpi kaj informi la fremdulojn kun fremda, nekonata lingvo.

Jam en 1908 ĉi tiun maleblecon ekkonis nia tiama policprezidanto s-o Köttig. Por perfektigi la polican servon kaj ebligi publikan helpon ĉiurilate, li iniciatis instrui policistojn en Esperanto. Per helpo de tiama polica konsilanto d-ro Bartsch, nun intima registara konsilanto en ministrejo, li lernis Esperanton. Dudek policistoj poste fondis societon, prezidatan de s-o inspektoro Schreiber. La ministro permesis al la anoj poriri sur la uniformo la verdan stelon.

Por pli kaj pli utiliĝi la lingvon Esperanto en la komuna kontraŭkrimula batalo, en 1911 fondiĝis „Internacia Esperanta Policasocio“, prezidata

de policinspektoro Miguière, Paris. Oficiala organo „Internacia Polica Bulteno“ funkcias kiel interkomprenilo. Okazis la terura milito kaj detruis ĉi tiun internacian kaj baldaŭ la societan organizaĵon. La menciitaj favorantoj, s-oj Köttig kaj Bartsch, forestis, la societa prezidanto grave malsaniĝis kaj ĉesis labori.

Tamen la societo en 1920 estis reorganizata. Ĝi denove ekzercadis regule kaj komencis novajn kursojn. Intertempe ĝiaj anoj pliiĝis de 29 ĝis 58.

La societo trovis novan favoranton en nia nova policprezidanto d-ro Grille. Li eĉ akceptis la societan protektoraton kaj antaŭ nelonge konsentis la societan proponon, starigi laŭ tiu

„Esperantan Policinformejon“

en nia Polica Prezidejo, Schiessgasse 7, la unuan inter la policoj de la mondo. Per ĉi tiu oficejo nia policestraro oficiale korespondas Esperante. Ĝi estas je la dispono de ĉiu Esperantisto kaj preta doni informojn ĉiuspecajn kontraŭ aldono de respondukupon.

La bildo en ĉi tiu numero prezentas la nunan societon kune kun ĝiaj favorantoj. La laŭnumere konigitaj sinjoroj estas:

1. D-ro Grille, polica prezidanto, societa protektoro,
2. Beier, registara konsilanto, lernas nun Esperanton,

3. Krumpholz, kriminala inspektoro, unuigestro de la kriminala policanaro, favoras Esperanton,

4. Brändel, polica sekretario, societa kasisto,

5. Pohle, kriminala ĉefpolicisto, societa prezidanto,

6. Mucke, ĉefpolicisto, societa sekretario, kaj kriminalaj, policaĵ kaj administraciaj oficistoj.

La societo denove interrilatas kun tiuj en Paris, Lisboa, Eisenach kaj Wiesbaden kaj kun diverslandaj izoluloj. La energia societa propagando ĉiunmaniere bone sukcesas. La policaĵ faggazetoj „Deutsches Polizei-Archiv“, scienca gazeto „Die Kriminalpolizei“ kaj „Die Sächsische Polizei“ favore akceptas propagandajn artikolojn.

Kelkaj aliranguloj, policaĵ scienculoj kaj eminentuloj nun interesiĝas pri Esperanto. Krome la diverslandaj fakunuigoj neesperantistaj, atentigitaj per komuna diverssocieta propagando, dum nuna konferenco en Amsterdam celas akcepti Esperanton kiel tutmondpolican komprenilon.

Entute la Esperanta movado inter la polico marŝas antaŭen. La nomita „Internacia Polica Bulteno“ baldaŭ reaperos. Per la nun aranĝita bilda propagando tra la mondo nia societo esperas kuraĝigi la lastajn indiferentulojn.

Venku Esperanto en la polica servo tutmonda, venku ordo, bonfarteco kaj sekureco ĉiulanda per policista helpo Esperanta!

Arthur Pohle, kriminala ĉefpolicisto, societa prezidanto, estro de la Esperanta Policinformejo, Dresden (Germ.).

Framasonio.

Grava grupo de respektindaj majstroj ĵus ekstarigis „Patronadan Esperantan Framasonkomitaton“, celantan la disvolvigon de la instruado de Esperanto en la lernejoj, kolegiojn, liceojn, popolajn universitatojn ktp.

Tiu komitato estis starigita sub la aŭspicioj de s-oj ĝeneralo Gerard, prezidanto de la Ordena Konsilantaro de la Granda Oriento de Francujo; Bernard Welhoff, granda majstro de la Granda Franclanda Logio; kaj Piron, granda majstro de la Internacia Miksita Ordeno „Le Droit Humain“, kiuj akceptis la honoran prezidantecon. S-o Marcel Huart, membro de la Ordena Konsilantaro de la Granda Franclanda Oriento, akceptis la efektivan prezidantecon.

S-o Lucien Cornet, senatano kaj urbestro el Sens (Yonne), eksprezidanto de la Esperanta Parlamentara Grupo, siaflanke akceptis la prezidantecon de la Honora Komitato.

La komitato esperas, ke ĝi ricevos multnombron da aliĝoj ĉe sia socia sidejo, 16, Rue Cadet, Paris 9, Hotelo de la Granda Franclanda Oriento.

Mallongaj Esp. Sciligoj.

Francujo. — Ruĝa Kruco.

La 25. aprilo okazis en Sézanne (Marne) parolado pri Esperanto de s-o Aussenac, lokomotivejestro, en la loka komitato de Ruĝa Kruco; ĝin prezidis ĝeneralo de Dartain, el la stabo de VI-a Armea Korpuso, oficiala delegito de la VI-a Milita Regiono.

Svedlando.

En Bromma post parolado de s-o E. Adamson kurso de s-o Flodin. — En Falun s-o Dahl instruas Esperanton al 10 gimnazianoj. — Novaj grupoj en Mora kaj Overkalix; studrondo en Skåre. — En Spjutsbygd studrondo de bontemplanoj, 10 lernantoj.

UEA-kunveno en Budapeŝt.

En UEA-kunveno en Budapeŝt (Hung.) la 28. aprilo s-o Balkányi raportis pri la servoj faritaj dum 1921: komercio 25, vojaĝo 5, informoj 1, enketoj 2, diversaj 22, pli gravaj servoj 4, korespondado proksimume 300.

Italujo. — Lernejo.

En Caserta prof. d-ro Quarta Danto komencis kurson ĉe Reĝa Instituto Teknika kaj en Reĝa Lernejo Teknika.

Nova grupo en Voghera.

Esperanto en Japanlando.

Ni elĉerpas el „La Revuo Orienta“:

Kanazaŭa. Granda parolado kaj muzika vespero kun ĉ. 600 partoprenantoj (preskaŭ duone virinoj). Kurso kun 67 p. en salono de komerca ĉambro. Fondiĝis grupo de 196 studentoj ĉe la Unua Mezlernejo.

Jo k o h a m a. Lekcioj antaŭ ĉ. 250 p. 2 kursoj ĉe YMCA por komencantoj kaj progresintoj.

N a g o y a. Kurso ĉe Katedro Kultura. Alia ĉe Nagoya Teknika Altlernejo.

Belgiujo.

Dum lasta semajno „La Verda Stelo“ en Antwerpen malfermis kvar novajn kursojn kun entute pli ol 150 partoprenantoj.

Gazetaro.

The Yorkshire Observer, Bradford, Angl., 25. 4. (Granda tagjurnalo, enhavas bonan ilustraĵon pri la Esp. konferenco en Genève, senditan de s-o J. T. Holmes el Shipley.

The Times, London, 21. 4. (Pri Genève.) Pri la konferenco de Genève parolis jenaj francaj gazetoj: Le Petit Méridional, Montpellier, 25. 4., L'Éclair, Montpellier, 25. 4., L'Hérault, Béziers, 26. 4., Le Petit Biterrois, Béziers, 26. 4. (la du lastaj en grandaj artikoloj pri la instruado de Esp.), Le Journal, Paris, 25. 4., Le Journal du Peuple, Paris, 21. kaj 25. 4.

Pri la progresoj de Esperanto parolis jenaj francaj gazetoj: L'Intérêt Public, Cholet, Franc., 30. 4., L'Action Républicaine Nemours.

Feuille d'Avis des Montagnes, Locle, Sviz., 19. 4. (Progresoj de Esp.)

Feuille d'Avis, Montreux, 8. 4. (malfavora artikolo); 24. 4. (Art. La miraklo de Esp. tre favora kun cito de ET kaj la reklamo por Montreux.)

Unser Volk, Krefeld, Germ., 7. 5. (Ampleksa Esp. angulo kaj kurso.)

Danziger Volkblatt, 29. 4. (Esp. angulo.)

Nowy Dziennik, Kraków, 28. kaj 30. 4., kaj Kuryer Codzienny, 30. 4. raportas pri vizito de aŭstrala Esperantisto s-o Hudson.)

Norsk Bokblinder-Tidende, Kristiania, 1. 5. (Esp. angulo.)

Közep Duna, Budapest, 30. 4. (Uzas parte Esp.)

Recenzoj.

LIBROJ.

NOVA VOCABOLARIO ESPERANTO-ITALIANO. De G. Mezzini. 106 pĝ. kaj kovrilo. 16 : 11 cm. Eldonejo A. Paolet, S. Vito al Tagliamento. Prezo 5.80 liroj aŭ 5 frankoj.

Laŭŝajne tre taŭga vortaro, kiu mallonge kaj trafe donas la tradukojn en italan lingvon. Bona ideo estis aldoni iliajn de propraj nomoj kaj de landnomoj. Precipe la lastaj oni devus ŝati, — se ne la „jo“ senescepte estus uzita. Sirange estas, ke prof. Peano kunlaboris, kvankam nur kiel verkinto de antaŭparolo. (H. H.)

PER TOLBOATO. Skizo de Jotoka. Ilustrita. 24 pĝ. karton. Eldonejo Oskar Ziegler & K-ko, Markt-Redwitz, Bayern, Germ. Prezo 6 gmk., alivelutaj lendoj 12 gmk.

LA DEMANDO PRI LA PLIBONIGO DE LA MUZIK-SKRIBO kaj ĝia solvo per la Aŭtonoma Muziknotado. Historio de la Muzikskribo kaj de la ĉefaj provoj pri plibonigo. De L. Cogen. Eldonejo de „Belga Esperantisto“, Antwerpen, 45, Kleine Beerstraat. Prezo 0.80 belg. fl. aŭ 2 resp.-kup.

Tre interesa broŝureto, kiun ni rekomendas al ĉiuj interesatoj.

DIE LEIPZIGER MUSTERMESSE mit technischer Messe und Baumesse.

Bone presita kaj bele ilustrita broŝuro tute en Esperanto, esceptite la itala paĝo, kiu estas germanlingva. Havebla ĉe Messami, Esperanto-Pako, Leipzig, Markt 4.

GAZETOJ.

L' Esperanto. Marto kaj aprilo. Adreso: S. Vito al Tagliamento, Italujo. Kun interesaj artikoloj kaj ilustraĵoj. La Revuo Orienta. Marto. Adreso: Tokio, Utiogome, Sin'ogaŭamaĉi 11-14, Japanujo.

Holanda Esperantisto. 27. aprilo kaj 4. majo.

Esperanto-Film, marto kaj aprilo. Adreso: 45, rue de la Petite Ourse, Antwerpen, Belg. — Dupaga propagandilo (sciligoj por gazetaro kaj publiko) kun la novaĵoj de Esp. En franca kaj flandra lingvoj.

Konkordo. Majo. Adreso: Zagreb, Jugoslavio, Jezuitska 1. — Interesa artikolo pri Esp. gazetaro. Detala enlanda kroniko.

Germana Esperantisto. Aprilo-majo. Breslau-numero. Enhavas informon pri kunigo de la firmoj Friedr. Ellersiek kaj Ader & Borel. Nova adreso: Ellersiek & Borel, Dresden 1, Struvestr. 40.

La Espero. Aprilo. Adreso: Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1, Sved. Kun 2 ilustraĵoj.

Hispana Esperantisto. Marto. Kun ilustraĵoj pri belega Montserrat.

Norvega Esperantisto. Jan., febr.-marto. Reviviĝa post longa dormo. Maŝinskribita. Adreso: M. Muribo, villa „Glenna“, Bekkelagshøgda.

Ruĝa Esperantisto. Aprilo.

Agitanto. Jan.

Amerika Esperantisto. Aprilo.

La France Postale Esperantiste. Aprilo. Trimonata franc-lingva propagandilo folio.

Der Arbeiter-Esperantist. Majo.

Belga Esperantisto. Marto-aprilo. Bela 52- (44-) paĝa kajero. Kun aldono „La plibonigo de la kalendaro“.

Suisiaj Idistoj. Majo.

Nekrologio.

Dum aprilo mortis du fervoraj francaj samideanoj:

S-o Pallier,

eks-representanto franca (résident) en Hindo-Hinjujo kaj Kamboĝujo, subite mortis en la aĝo de 59 jaroj. Li aliĝis al Esperanto en Alger en 1919, dank' al ruĝa broŝuro, donita de s-ino Tlard.

Majoro Dumesnil,

batalonestro de 150-a Infanteria Regimento en Colmar, estis varbita de kapitano Bayol, lia regimanta kamarado, kaj kun s-o Demarcy li verkis lernolibron „Esperanto sen instruisto“.

Nederlanda Anonima Societo
Luksa-pano Fabrikoj
 antaŭe Henri J. Carels.
 50 Butikoj:
 Den Haag, Haarlem, Amsterdam.
Luntejo Carels
 (ĉefo: H.A. Scharwächter)
 63 Weimarstraat, Den Haag.
 Oni parolas Esperanton.

Oni postulu la „Victoria“-Eksport-Prezistion en germana-hispana au germana-angla lingvoj.

Butin & Jung
 Esperanto-Eldonejo
 Godesberg a. Rh. (Germ.)
 Postĉek-Konto K81n 920 56

liveras ĉiujn haveblajn Esp. librojn, t. e. instruajn verkojn, originalaĵojn, tradukaĵojn el la internacia bela literaturo, Esperantaĵojn, sigelmarkojn ktp.

Al eksterlandaj mendantoj, al kiuj ni liveras nur post antaŭa pago (prefere per ŝtataj monbiletoj), ni rekomendas la malfermon de konto ĉe ni neuzitajn poŝmarkojn ni ne akceptas kiel pagon.

Oni direktu ĉiun skribaĵon al nia firmo Butin & Jung en Godesberg kaj ne al s-o Teo Jung, eldonanto de ET en Horrem, ĉar la eldon-ejo de ET estas tute sendependa de la nia kaj ne plenumos mendojn por ni.

Oni atentenu niajn anoncojn en la venontaj numeroj!
 Specialan katalogon ni ne eldonis.

Nederlanda Esperanta
Komerc-Oficejo
 (Nederlandsch Esperanto-Handelsbureau)
 Diergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)

Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin ŝargas per la dissendo de cirkuleroj.
 Prokuras komercajn adresojn.
 Prizorgas la anoncadon en Nederlando.
 Interrilatas kun nederlandaj komercistoj kaj industrilistoj.
 Sciigas la kurzojn de valutoj kaj valorpapiroj.

La Interŝanĝo

Franca kaj Esperanta revuo ilustrita por korespondadoj, interŝanĝoj kaj komercaj interrilatoj aperas sep fojoj jare, estas 32- aŭ 40-paĝa, ne enkalkulante la liston de la aliĝantoj sendatan nur al la abonintoj.

Jara abonprezo: 10 francaj frankoj.
 Specimena n-o: 1 franca franko aŭ 4 respond-kuponoj.

A. Bonnefous, Direktoro, Béziers (Hérault), Francujo, 3, rue du Capus, et 22, rue Viennet.

Malkaraj Korbmebloj

riceveblaj el pola fabrikejo pogranda kaj podetale. Kompletaj salonoj, konsistantaj el 6-10 pecoj (tablo, sofo, du foteloj, du seĝoj, unu taboreto, du florpedestaloj kaj unu florujo) kostas nur 72 000-82 000 pol. mk.

Postulu fotogr. desegnojn kaj informojn de
Prof. Miecz. Sygnarski,
 Bydgoszcz Polio Kordecklego 19

Libra kaj Arta Presejo
Emil Friedr. Adolph
 Fond. 1888. Hassloch (Palatinato) Telef. 58

Fabrikado de bonkvalitaj artpremaj prospektoj kaj de ĉiaj presaĵoj por komercu kaj industrio en ĉiuj eŭropaj lingvoj, inkluzive Rusa kaj Esperanta

Oni petu oferton.
 Korespondado: Esperante, Angle, France, Germane ktp.

Se vi serĉas liveraĵojn por ĉiuspecaj komercaj kaj industriaj aŭ se vi deziras akcepti la reprezentadon de eksport-kapablaj firmoj, turnu vin en via propra intereso al la

**KOMERCISTA ESPERANTO GRUPO
 FREIBURG I. BR. (GERM.)
 KATHARINENSTR. 14**

kiu havas bonajn rilatojn al germanaj industriaj kaj komercaj rondoj. — Perado senkosta. — Al demando aldonu resp.-kup.

BRODAĴOJN DE ST. GALLEN
 por tolajo unuakvalitajn vi aĉetas plej profitdane senpere ĉe la fabrikanto.

Postulu specimenojn!
Gottfried Schoch, St. Gallen-Ost, Svis.,
 Storchenstr. 31.

Eldonistoj!
 La Societo Anonima „Centra Esperanto-Librejo“
 Direktoro: s-o F. C. Koens
 Bankastraat 2, a Hago (Holando)

petas eksterlandajn eldonistojn pri alsendo de unu specimeno de ĵus aperintaj bonaj Esperantaj libroj kaj sciigon de novaj impresoj.
 Esperantaj katalogoj estas petataj.

LEIPZIG-A FOIRO
 La ĝenerala internacia Foiro de Germanujo

La unua kaj plej granda Foiro de la mondo. Same grava por ekspozantoj kaj por aĉetantoj.

Ĝenerala Specimenfoiro kun Foiroj por Tekniko kaj Konstrufako

Aŭtuna Foiro 1922 de la 27a de aŭgusto ĝis 2a de septembro.
 Printempa Foiro 1923 de la 4a ĝis 10a de marto.

Informojn donas kaj aliĝojn akceptas la Fairoseĝo por la Specimenfoiroj en Leipzig:
MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN IN LEIPZIG

Art-Amikoj,
 Artajo-, Bildo- kaj Libro-Vendistoj,
 kiuj havas intereson por belegaj akvareloj, oleopentraĵoj ktp. de eminentaj kaj konataj pentristoj aŭstriaj, turnu sin a
Sepp Osterer, Graz, Aŭstrio, Gleisdorfergasse 5.
 Malaltaj prezoj.

Abonejoj de ET
 en la landoj

Aŭstria: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg; por Wien „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien II/1, Postamt 34
 Belgia: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen. Poŝt-ĉeka n-o 284 20.
 Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
 Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Králové. Otto Lumpe, Trautenau.
 Estona: Est. Esp. Unuiĝo, postkasto 6, Tallinn.
 Finna: O.Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
 Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.
 Hispana: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy Catalan.
 Hungara: Paŭlo Balkányi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI
 Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.
 Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.
 Litova: Paŭlo v. Medem, Smelju g-v 12, Kaunas (Kovno).
 Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 8125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordecklego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
 Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.
 Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1
 U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

Anoncoj.

Familiaj anoncoj senpage. Aliaj anoncoj (nur akceptataj por minimume du alnekvaj impresoj) kostas po du impresoj kaj po 20 vortoj 0.20 dol., 0.50 fl., 1 nord. kr., 1 šil., 1 sviz. fl., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fl., 7 fmk., 8 kč., 25 vmk., 60 hung. kr., 250 pmk., 250 aŭstr. kr., internacie 5 e-amp. resp.-kup.; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncoj laŭdezire de la abonkonto, de aliaj ni impresas anoncojn nur post antaŭpago. — Anoncoj devas alveni 10 tagojn antaŭ publikigo.

NASKIĜO. Al ges-anoj M. L. Kaplan en Wolkowsky, str. Szeroka 104 a, Polio, naskiĝis filo nomita „Izraelo“.

EDZIĜO. S-o Alfredo Santoni, doktoro de astronomio, kaj s-ino Peynetti Maria anoncas sian edziĝon. — Torino (Ital.), 29 4. 1922.

ĜEJUNULOJ VERKEMA! Aliĝu al manuskripta rondiranto „Junula Revuo“! Sendu kunlabore literaturaĵojn, precipe originalajn! Postulu informojn kontraŭ respond-kuponon. Adresu al s-o H. Seppik, Maneŝi 7-12, Tallinn, Estonujo.

KABE, INTERNACIA KRESTOMATIO. Prezo 40 gmk. inkluz. rekomend. forsendo. Eldonejo „Esperantista Voĉo“, Jaslo, Pollando; ĉiuj Esp. libroj riceveblaj; poŝtĉek-konto Leipzig, n-o 89978.

RUSOJ ATENTU! kie troviĝas nun s-ano Tadeoslane? Lia adreso antaŭ 4 jaroj: Odesa, ulica Poltavskoj Povedi, uĝol Greĉeskoj dom n-o 17, kvartira n-o 17. — Skribu al s-o Leib Contarj, del. UEA, Cauŝani-Nol, Besarabio, Rumanio.

LA PLEJ FAMAJ SONORIL-KONCERTOJ en la tuta mondo okazas en Mechelen (Malines) apud Antverpeno en Belgujo. Petu informojn de: Inlichtingsbureau (Inform-oficejo), Bruel 125, Mechelen.

ŜANĜO DE ADRESO. S-o Konrado Doménech, vicdel. de UEA en Girona, komunikas al siaj karegaj gekorespondantoj sian novan adreson kiu estas: „Vichy Catalan“, Caldes de Malavella (prov. Girona.) Hispanlando.

ŜANĜO DE ADRESO. S-ino Elza Merkert en Lodz, Polio sciigas, ke ŝia nova adreso estas: Lodz, Grabowa 33.

500 ADRESOJ DE JAPANAJ KOLEKTANTOJ de poŝtkartoj ilustritaj, poŝtkartoj ktp. estas aldonitaj al BES-adresaro (4-a eldono) aperonta en majo 1922. Prezo: 1.50 avis. franko. Sendu bankbiletojn aŭ neuzitajn poŝtkartojn! Por Aŭstrio, Polio, Rusio 50% valutrabato. Mendu ĝin tuj, se vi volas certe havi BES-adresaron! Karel Jelneĉ, Poŝtfako 60, Vinohrady, Ĉeĥoslovakio.

SIGELMARKOJN Esperantajn, insignojn, kaŭĉukajn stampilojn por societoj, poŝtkartojn liveras tuj Jozefo Kocotrek, gravuristo, Wien X, Arthaberplatz 3-14. Oni korespondas en lingvoj: ĉeĥa, germana, rusa kaj Esperanta. Postulu specimenojn de Esperantaj sigelmarkoj kontraŭ 2 respond-kuponoj.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Vladimiro Ottesen, Rusio, Oriol Gubstat-buro. deziras korespondi pri statistiko (ĝia metodo kaj organizaĵoj) kaj precipe pri metodologio de agrikultura statistiko; ankaŭ pri stenografo kaj kooperativa movado.

Boris Dzetoveckij, Kazanskaja ul. 71, Astrachan, Rualando, korespondas nur letere pri ĉia temo, prefere pri sablo-, vilaĝ- kaj arbarkulturo.

Poŝtkartoj de Litovio (Zeligovski), 500 ekzempleroj (tri specoj) 80 gmk., 1000 ekzempleroj 145 gmk.; ĉiuj eldonitaj poŝtkartoj en Litovio 195 gmk. — 50% antaŭpago. — L. Galinski, Sobieskiego 3, Białystok, Polujo.

Henriko Seppik, Maneŝi 7-12, Tallinn, Estonujo, junio 17-jara, deziras korespondi letere kun spertaj Esperantistoj pri literaturo, mitologio, popola vivo ktp.

Ni interŝanĝas poŝtkartojn: Rudolf Hampel, Trautenau, Frohnfessgasse 5; Hubert Laugner, Trautenau, Kreuzplatz 4, Ĉeĥoslovakio.

Mi deziras interŝanĝi poŝtkartojn kaj poŝtkartojn kun la tuta mondo. Adreso: Franz Mahria, Schatzlar 104, Ĉeĥoslovakio.

S-o M. Jankowski, Warszawa, Pol., str. Sluzewska 5/20, deziras interŝanĝi poŝtkartojn kun ĉiuj, prefere usonaj landoj.

J. Ritter, Sliska 48, Warszawa, Pol., korespondas pri natur-sciencaj, sociaj, politikaj ktp. temoj. Interŝanĝas poŝtkartojn, papermonojn, ilustr. gazetojn, broŝurojn, originalaĵojn.

F-ino Jadwiga Godlewska, Sw Jana 12, Pabianice, Pollando, deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj.

S-o Jozef Konderak, Sw Rocha 23, Pabjanice, Pollando, korespondas per ilustritaj poŝtkartoj kaj leteroj.

S-o Ignacy Goslawski, Targowa 24, Lodz, Pollando, deziras korespondi per leteroj kaj ilustritaj poŝtkartoj

Ph. Smulders, Beeklaan 202, Hago, Nederlando, deziras interŝanĝi aŭ aĉeti poŝtkartojn (ne francajn, germanajn aŭ anglajn).

S-o Motel Cacichis, Cauŝani-Nol, Besarabio, Rumanio, deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj per poŝtkartoj, poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj.

Aszod, Hungarlando, s-o Zoltano Balazsy, sendas 100 hungarajn poŝtkartojn kontraŭ poŝtkartoj de ĉiuj aliaj landoj.

Fraŭlo Slava Bohanus (20-jara), Slezska Ostrava, u poŝty, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj aŭ leteroj kun ĉiulandanoj, ankaŭ kun fraŭlinoj pri amikaj temoj.

Mr. Watson, Wien, 18, Gertzgasse 138/12, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun Estonio, Latvio, Finnlando kaj aliaj.

Max Hubl, Salzburg, Aŭstrio, Auerspergstrasse 54, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj, precipe eksterdeŝtaj. Ankaŭ interŝanĝas poŝtkartojn.

Sinderenantaj Esperantistoj el la tuta mondo! Se vi deziras interkunligon kaj korespondadon kun Rusĉuka Lernanta Neŭtrala Sinderenanta Societo „Sobrecio 16“, turnu vin al s-o Ivan Kovačev, strato Malriĉa Kvartalo 37, Rusĉuko, Bulgariando.

Kapablaj reprezentantoj serĉataj por ĉiuj landoj.

Unuakvalitaj Ŝtalojoj de Solingen:
 Raziloj, Razaparatoj, Razilklingoj, Poŝtranciloj, Tondiloj, Hartondiloj, je fabrik-prezo.

Bildoj kaj originalaj specimenoj haveblaj.
 Perado per
Komercista Esperanto Grupo
 Freiburg i. Br., Germ., Katharinenstr. 14.
 Aldonu al demando respondkuponon.

Importo. Eksporto.

Pollanda Komerc-Oficejo
 Adolfo Oberrotman, Varsovio, Krak-Przedm. 10

deziras ligi komercajn rilatojn kun gravaj eksterlandaj firmoj, speciale en teknikaj maŝinoj, manufakuro kaj galanteriaj artikoloj; donas ĉiujn informojn pri la polaj komerclokoj.

Nur pogranda firmoj bonvolu sendi ofertojn kun specimenoj aŭ katalogo.

Reprezentado. Perado.

HUNGARA VINO.
 La Tokaj-Hegyalja-Provinca Vin-komercista A. S. Budapest malmultkoste

eksportas unuarangajn vinojn al ĉiuj landoj. (En lastaj monatoj oni sendis al Brazilo, Ĉinio, Nederlando, Germanio.)

— Botelvinoj. —
 Mondfamaj „Tokaj“-vinoj!

Serlozaj firmoj kaj reprezentantoj ricevas ofertojn pere de
Paŭlo Balkányi, Budapest VI,
 Hajos u. 15.

Eksporto serĉata!

Aŭstria fabrika de ŝelkoj, gumaj ŝtrumpet-portiloj kaj pasamentoj, blankaj kaj koloraj kolumoj el tolo kaj pikeo serĉas komercajn interrilatojn kun eksterlando.

Specimena sendo jam kontraŭ 10 fr. frankoj aŭ alilandaj banknotoj samvalore en rekomendita letero.

Oskar Popper, Wien 7, Zollergasse 37.

Reprezentantoj serĉataj.
 Korespondas Esperante, germane, france kaj itale.

F-ino Emma Reinhardt, Stuttgart, Hauptstädterstr. 69, Germ., deziras korespondadon kun gesamideanoj tutmonde per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj.

S-o Paul Schön, Halle a. S. (Germ.), Röderberg 10, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtkartojn kun ĉiuj landoj.

S-o Vilhelmo Haas, fervoj-oficisto, Aldingerstr. 17, Kornwestheim bei Stuttgart, Württemberg, Germ., deziras interŝanĝi poŝtkartojn kun la tuta mondo.

Kontraŭ 50 poŝtkartoj vialandaj mi sendos 50 germanajn. Akceptas aĉetojn por ĉiuj germanaj komercaĵoj. Wilhelm Hilbers, Hamburg 13, Grindelallee 99.

S-o Erich Hunger, Friedrichstr. 4, Merseburg a. Saale, Germ., deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj (bfl.) kun ĉiuj landoj, precipe kun fraŭlinoj.

S-o Rud. Ifo Bierlumpfel, Lauchstedter Str. 45, Merseburg a. S., Germ., deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

Instruit-seminariano Franz Lischke, Merseburg, Germ., Roter Feldweg 4, deziras interŝanĝi poŝtkartojn kaj korespondi kun ĉiulandanoj, precipe fraŭlinoj.

S-o Ernst Reiss, Merseburg, Germ., Weissenfelsstr. 26, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

S-o Erich Kreyer, seminariano, Gutenbergstr. 27, Merseburg a. S., Germ., deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn (bfl.) kun la tuta mondo.

Frico Reiche, Schupokraft, Merseburg a. Saale, Germ., deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kun la tuta mondo.

Poŝtkart-kolektantoj atentu! Mi serĉas filatelistajn interrilatojn kun la tuta mondo. Mi ŝanĝas kaj vendas. Mi posedas grandan aron da belaj aŭstriaj poŝtkartoj. Kontraŭ referencoj mi forsendas belajn elektaĵojn de aŭstriaj poŝtkartoj, por aĉeto aŭ vendado. — Josef Kolhofer, Wien 13/4, Zehetnergasse 37.